

Prelego de Henri Vatré pri Edmond Privat
Claude Gacond, 111-a radioprelego, 1965.11.17 & 1965.11.20

Atentu esperantistoj ! Ĉi tie parolas Svisa Kurtonda Radiostacio. Prelegas Claude Gacond.

Kiel mi anoncis la pasintan semajnon, mi hodiaŭ resumos altvaloran prelegon de Henri Vatré prononcitan je la 13-a de junio en la salono de la urba biblioteko de La Chaux-de-Fonds. Se la temo vin interesas, vi povas peti al Svisa Kurtonda Radiostacio en Berno la tekston de tiu prelego, kiu aperis en *Inter Ni*, la organo de Esperanto-Edukistaro de Svislando.

Henri Vatré fariĝis vera fakulo pri nia literaturo. Lin legante aŭ aŭskultante oni ne povas kredi, ke li estas meminstruito. Esti aŭtodidakto kaj devi prelegi post gimnazia profesoro ne estas agrabla situacio. Henri Vatré majstre demonstris, ke Esperantujo kaŝas intelektan eminentularon. Pro manko de esperantaj katedroj en niaj universitatoj fakuloj devas ĵaluze konservi por si mem la trovitaĵojn. Nia espero estas, ke iom post iom oni komprenos la neceson instrui ne nur nian lingvon, sed ankaŭ ĝian literaturon. Henri Vatré tiam povos alporti multon.

En La Chaux-de-Fonds li prelegis pri la poezia esprimo ĉe Edmond Privat nur ĉerpante ekzemplojn el liaj prozaĵoj. Li volis demonstri, ke poezio ne nur troviĝas en poemoj, sed ke ĝi valorigas ankaŭ verkojn instruajn, filozofiajn, edukajn, sociajn, politikajn, historiajn aŭ alispecajn. Li volis al ni rimarkigi, ke Edmond Privat, kiam li havas la tempon pensi sian verkadon, traktis siajn temojn poeziece. Pro tio liaj libroj tiom ĉarmas.

Edmond Privat, kiel Zamenhof, posedis tiun neoftan meriton malfermi niajn okulojn al pli da lumo, malŝtopi niajn orelojn al pli da vero. Li estas fakulo, kiu posedis veran talenton por komuniki senpere kun nefakuloj kaj rekte influi la plej vastan publikon. Li sukcesis mirinde faciligi, popularigi la formon de sia mesaĝo, nenion deprenante de ĝia esenca valoro. Tute male.

Koncerne la ĉefverkon de Edmond Privat Henri Vatré parolis tiel : « *Inter la verkoj, kiuj nin persone ĉarmis, elstaras vere rimarkinda libreto, kiun d-ro Privat publikigis en 1931. Ĝi estas resumo de kurso farita ĉe la ĝeneva universitato. Ĝia titolo **Esprimo de sentoj en Esperanto** karakterizas la simpatian manieron de la aŭtoro. Li estus povinta nomi ĝin iom pedante **Traktato pri la esperanta stilstiko**, sed ne, li preferis simplan etiketon, kiun ĉiu tuj komprenas. La kvar unuaj ĉapitroj priskribas la parolan materialon kompare kun tiu de aliaj lingvoj. La sekvaj ĉapitroj montras, kiamaniere fleksiĝas tiu materialo sub la vigla ludo de la homaj sentoj, kiuj neeviteble postulas kaj trovas kontentigon de sia esprimbezonoj. Teknikajn esprimojn de lingvoscienco la aŭtoro kiom eble evitis por faciligi la legadon al ĝenerala publiko.*

*D-ro Szilágyi skribis : « Mi mencias lian lingvistikan ĉefverkon **Esprimo de sentoj en Esperanto**. Pli science, pli klare kaj pli ĝueble oni ne povas pritrakti teoriajn problemojn, kiel ili aperas en tiu ĉi libreto. »*

Kaj certe, daŭrigas Henri Vatré, en tiu ĉi libreto ni trovas la ŝlosilon al la mirinda tekniko de d-ro Privat. La sekreto de lia sorĉo ne fontas sole el inspiro, sed el observo kaj laboro. Lia poezio estas la rezulto de intencita ago.

Poezio fontas unue el la penso kaj el la sento, sed necesas trovi adekvatajn rimedojn por ĝin esprimi. Nura intenco ne sufiĉas. »

Henri Vatré rimarkigas, post lego de eroj el la novelo **Tamen perdota**, la mallongon de la frazoj, la elekton pri vortoj temaj kaj la sonharmonion. Estis belega leciono, en kiu multaj okuloj kaj oreloj malfermiĝis al vivo nova. En multaj hejmoj, post tiu renkontiĝo, la novelaro de Edmond Privat eliris la librobreton por atenta relego.

Prelego de Henri Vatré pri Edmond Privat
Claude Gacond, 111-a radioprelego, 1965.11.17 & 1965.11.20

Nia poeto skribis : « *Literaturo estas por ĉiu lingvo la beliga centro, en kiun alfluas la sango por puriĝi kaj poste refluvi en ĉiujn partojn de l' vivanta korpo.* »

Edmond Privat donas tie belan difinon de la rolo, kiun li ludis por la formiĝo de la vivanta korpo Esperanto. Liaj verkoj, pro sia poezieco, estas vera beliga centro, en kiu la sango de nia lingvo eterne puriĝos.

Vi aŭdis Radio-Svislandon, kiu, per la voĉo de Claude Gacond, diras al vi :

Ĝis reaŭdo !

-oOo-